



Bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2014 (201)

27. 5. 2014

Nova estraro elektita



La 27-an de februaro nia klubo elektis sian novan estraron. Novaj komitatanoj estas Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Piščíková, Pavla Zemanová, Jiří Patera, Jan Šebetovský, Vít Guglielmo Mišurec... (*legu plu sur la paĝo 2*)

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Jubileo de Eduard Kühnl (J. Patera)	6
Unio proksima kaj malproksima (T. Bř.).....	7
Travivaĵoj el Bruselo (J. Galuška)	9
Ondo super ondon ascendas (V. Ludíková) ..	12
Se mi eble ne revenus (J. Karen)	14
Kvildo, mia amo (D. Nerková)	16
Kuriozaĵoj	21

Klub esperantistů v Praze

bulteno.cs-retromusic.net

Ve Smečkách 25, Praha 1

schůzky každý druhý čtvrtek
od 17 do 19 hod.

t.brighthouse@seznam.cz

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brighthouse@seznam.cz

AKTUALAĴOJ

... La nova komitato decidis pri ŝanĝo de la kiamo de kunvenoj. Ili okazos plue ĵaŭde, sed nur ĉiun duan semajnon kaj ekde la 17-a ĝis la 19-a horo, por ke ankaŭ gelaborantoj kaj gestudentoj povu partopreni. La kunvenoj havos antaŭdeterminitan programon (temon).

La komitato decidis krei novan retpaĝaron, kiu jam aperis kaj troviĝas sur la adreso <http://bulteno.cs-retromusic.net/> origine kreita kiel paĝaro de la Bulteno. Oni ankaŭ preparis novan dekoracion en la montrofenestro de la kunvenejo Ve Smečkách. La komitato plue faris novan elektronikan datumbazon de membroj kaj favorantoj kaj liston de iliaj retadreso por plibonigi komunikadon ene de la klubo. Oni nun ankaŭ diskutas pri la ŝanĝo de la banko, ĉar la konto ĉe la nuna banko (Česká spořitelna) estas tre malavantaĝa.

Nova retpaĝaro „Bulteno“ kaj nova adreso

Sur la nova kluba retpaĝaro Bulteno <http://bulteno.cs-retromusic.net/> vi trovos aktualajn informojn pri la agado de nia klubo kaj ĝenerale pri la agado de ĉiuj geesperantistoj en Prago, programon de la kunvenoj, informojn pri la laboro de la komitato, revuon Bulteno en elektronika formo kaj liston de interretaj ligoj.

La klubo havas novan adreson ĉe la geedzoj Mišurec – Pištíková:

c/o Jiří Mišurec, Jirečkova 5, 170 00 Praha 7

Pri la agado de nia klubo de post la jarkunveno la 4-an de oktobro 2012

Jiří Patera

La jarkunveno elektis novan komitaton de la klubo, kaj nome la prezidanton Ing. Trojan, la vicprezidanton Ing. Krolupper, la kasiston J. Patera, la komitataninon P. Zemanová kaj la revizorinon Ing. Turková.

La 8-an de novembro 2012 ni havis solenan kunvenon okaze de la 110-a datreveno de la fondo de nia klubo. La klubo estis fondita la 9-an de novembro 1902 kaj post la klubo en Brno ĝi estis la dua esperantista klubo sur nia teritorio. Okaze de tiu jubileo ni ricevis salut-leteron de la komitato de ĈEA.

Nia tradicia Zamenhof-vespero kaj samtempe Kristnaska vespero okazis la 13-an de decembro 2012. Venis ne nur niaj klubanoj, sed ankaŭ iuj E-Mentalanoj kaj esperantistaj junuloj. Ĉeestis ankaŭ kaj prelegis aŭstra e-isto Anton Oberndorfer, la posedanto kaj praktikanto de Esperanta Retradio. La kunvenon filmis Petro Chrdle kaj ni poste povis vidi la filmon en la Retradio de A. Oberndorfer. Cetere tiu ĉi aŭstra esperantisto vizitis nian klubon kaj prelegis ankaŭ la 21-an de februaro 2013 kaj la 16-an de majo, kiam li rakontis pri sia

vizito en Andaluzio. Cetere pri sia vizito en Italio prelegis kaj fotojn montris V. Pištíková la 25-an de aprilo 2013.

Nia komitatano Ing. Jar. Krolupper estas ne nur originala E-poeto, sed ankaŭ tradukanto de ĉeĥa poezio en esperanton. Sed li esperantigas ankaŭ la ruslingvan poezion de la rusa poetino Ljubov Vondroušková, vivanta en Moravio. Aperis jam tri volumetoj de ŝiaj lirikaĵoj. La 5-an de januaro okazis en Brno la 3-a internacia rusa konferenco de la Sudmoravia regiono, por kiu estis invitetaj ankaŭ esperantistoj, do ĉeestis ankaŭ M. Turková. Pri tiu ĉi grava literatura aranĝo ŝi poste rakontis en nia klubo.

La 16-an de majo M. Turková prelegis pri malvualigo de nova monumento de J. Hašek en Lipnice, kiun faris la skulptisto Radek Dvořák. La monumento konsistas el dek partoj, sur kiuj estas citaĵo el Ŝvejk en dek lingvoj, inter ili ankaŭ en esperanto. Ĉi-kaze estas necese aldoni, ke por gravurado de la E-teksto de la monumento financan donacon liveris gee-istoj M. Turková kaj V. Kaprál.

La 22-an de junio 2013 kelkaj klubanoj partoprenis la esperantan prezenton de RUR de K. Čapek en Teatro Na Prádle, en la kadro de festivalo "Teatro de lingvoj". Post jardekoj ni havis denove E-lingvan teatron en Prago.

Post la somera libertempo en nia kunveno la 12-an de septembro nia prezidanto J. Trojan, kiu partoprenis la UK en Rejkjaviko, prelegis pri la kongreso kaj pri Islando. La 3-an de oktobro li daŭrigis la prelegon kune kun M. Turková, kiu ankaŭ estis en Rejkjaviko.

La 17-an de oktobro ĉeestis nian kunvenon M. Smyčka kaj riĉigis la kunvenon per sia kantado. Li venis ankaŭ la 21-an de novembro kaj denove la 12-an de decembro, okaze de nia Kristnaska vespero, kiam li deklamis kaj kantis E-lingve.

La kunveno la 31-an de oktobro estis dediĉita al la rezultoj de la asocia konferenco en Nymburk, en la kunveno la 21-an de novembro ges-anoj Dvořák prezentis al ni la poemaron de O. Březina „Mia patrino“.

La 23-an de januaro 2014 vizitis nin la ĉeĥa poetino Delicie Nerková, disdonis al ni siajn poemarojn kaj esprimis la esperon, ke ŝiaj verkoj aperados E-lingve en nia Bulteno. J. Patera esperantigos ŝiajn prozaĵojn. Samokaze M. Turková rakontis pri la nova rusista konferenco en Brno, kiun ŝi partoprenis.

Tre grava estis por ni la 10-a de februaro 2014, ĉar tiam okazis la bapto de la ĉeĥa traduko de libro de Tivadar Soros „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ en salono de Unuiĝo de Interpretistoj kaj Tradukistoj en Prago. La solenaĵon ĉeestis multaj geesperantistoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el aliaj urboj, kaj ĉefe la tradukistino Jindřiška Drahotová, la redaktoro de la libro Humphrey Tonkin kaj la eldonisto Petr Chrdle. La libro pri la persekutado de judoj en Budapeŝto fare de gestapo certe estos interesa legaĵo pri la vivo de familio Soros kaj precipe de la juna George Soros, la nuntempa mondkonata usona miliardulo kaj filantropo. La verko estas esperanta kontribuo al la monda literaturo.

Post la solenaĵo okazis vespere en salono de Masaryk-stacidomo kunveno de pragaj esperantistoj sub gvido de s-ano Pavla Dvořáková el Písek. Nia Esperantista Klubo en Praha, malgraŭ sia 112-jara historio, troviĝas nun en malbona stato, ĉar la ĝisnunaj membroj maljuniĝas kaj ankaŭ bedaŭrinde

forpasas. Tial estas necese, ke la pli junaj geesperantistoj en Prago, agantaj ekster la klubo, enviciĝu en la klubon kaj tiel vivigu kaj disvastigu ties aktivecojn. Pri tio devus decidi la hodiaŭa kunveno.

Bonŝance la unua tiudirekta paŝo jam okazis. La Bulteno de nia klubo jam havas novan redaktoron Tomáš Břicháček kaj la jarkunveno de la klubo, okazinta la 27-an de februaro, elektis novan komitaton de la klubo. La nova prezidanto de nia klubo fariĝis Tomáš Břicháček, sekve li estas kaj la prezidanto de la klubo, kaj la redaktoro de la Bulteno. La vicprezidanto de la klubo kaj samtempe la ekonomo fariĝis Jiří Mišurec, la aliaj komitatanoj estas Vlasta Piščíková, Vít Guiglielmo Mišurec, Jan Šebetovský, Pavla Zemanová kaj Jiří Patera. La grava ŝanĝo estos en tio, ke la kunvenoj de la klubo ne plu okazos ĉiusemajne, sed ĉiun duan ĵaŭdon ekde la 17-a horo, en la kunvenejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25. Tial la kunvenojn povos viziti ne nur la pensiuloj, kiel ĝis nun, sed ankaŭ la laborantaj kaj studentaj klubanoj. La kunvenoj havos laŭplanan antaŭpreparitan programon, kio plibonigos la vivon de la klubo.

Aperis nova libro „České vize Evropy?“ (Ĉu ĉehaj vizioj de Eŭropo?)

La 400-paĝan libron eldonis Academia Praha, redaktis ĝin Petr Hlaváček. En la libro estas artikoloj de 47 aŭtoroj, politikistoj, sciencistoj, artistoj pri la ĉehaj opinioj pri la nuntempa organizado de Eŭropo. Nia samideano Max Kašparů en sia teksto „Eŭropo – la krizo de lampoj kaj naŭ futuroj“ pritraktas la lingvan problemon kaj rekomendas enkondukon de esperanto kiel komunikan lingvon apud la angla. Fotografajo en la libro estas de Marek Blahuš.

El leteroj de niaj gelegantoj

Tomas,

gratulon al via unua numero de Praga Bulteno, gratulon al Praga Bulteno al ĝhia 200a numero ;-), gratulon al (ankau) elektronika formo de ĝhi (kion mi chiam sopiris atingi che Esperantisto Slovaka, sed mi ne havis kapablojn realigi tion miaredaktorectempe, nur nun Stanko Marchek jam sukcesis tiucele).

Mi antaŭ kelkaj tagoj chi tie en Herzberg foliumis paperajn numerojn, kaj kun nostalgio rememoris pri s-ano Marik, pri Jindro Ondracek kaj pri aliaj kiujn mi iam renkontis en praga klubo. Pri la forpaso de Helenka Maudrova mi eksciis nur el la reago de Jitka Skalicka... mi kelkfoje vizitis Helenkan ankaŭ en ŝia hejmo, ankaŭ ŝian edzon mi konis... bedaurinde, la homoj ne nur venas, sed ankaŭ foriras...

Tomas, vi komencis bone, mi deziras al vi same bonan daurigadon! Se vi plusendados al mi la Bultenon, mi estos nur danka al vi...

Magdaléna Feifičová, Slovakio

Venontaj aranĝoj

Ekde la 27-a ĝis la 29-a de junio 2014 okazos la tradicia E-mentala gastronomia aranĝo **Viando** – ĉi foje na Chotýčany.

La 9-an de aŭgusto 2014 okazos la **2-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando** (Zirkelstein+Kaiserkrone).

La 6-an de septembro 2014 okazos la **3-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando** (Brand)

Ekde la 9-a ĝis la 11-a novembro okazos la **6-a Brila Internacia Esperanto Renkontiĝo (BIERo)**. Inter planataj programeroj estas trarigardo de urbo, vizito de bierfabriko en Nymburk, ludoj, testo, bunta kutima matenmanĝegado...

Detaloj pri la aranĝoj estas atingeblaj sur la repaĝaro de E-mental:
<http://www.e-mental.cz/archiv/category/klubo/niajarangxoj>

Pasintaj aranĝoj

La 10-an de februaro 2014 ekde la 16-a horo en la sidejo de Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj, Senovážné náměstí 23, Praha 1 okazis **bapto de la ĉeĥa versio de *Maskerado ĉirkaŭ la morto de Tivadar Soros***.

La 1-an de marto 2014 okazis la **tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno** kun festo de "adoptotago" kaj granda konkursa pikniko.

La 27-an de marto 2014 okazis la unua kunveno kun antaŭdeterminita programo. Estis **prelego de Vlasta Piščíková pri Kampanio** kun prezentado de fotoj.

Problemoj kun la kunvenejo

En aprilo kaj majo nia klubo havis problemojn kun la kunvenejo. La kvartalestrejo de Prago 1 portempe malpermesis la uzadon de siaj kunvenejoj laŭdire pro tio, ke en unu el ili foje renkontiĝis iuj ekstremistoj.

La prezidanto de nia klubo turnis sin perletere al la kvartalestro de Praha 1 kun peto, ke la klubejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25 estu denove libere alirebla al nia klubo. Tiam la kunvenoj de nia klubo povus okazi regule ekde la komenco de junio ĉiun duan ĵaŭdon de la 17-a ĝis la 19-a horo.

Jubileo de Eduard Kühnl

Jiří Patera



Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Eduard Kühnl**, unu el la pioniroj de nia E-movado. Li naskiĝis la 16-an de majo 1884 en Prago kaj jam de la jaro 1900 li sindone laboris por disvastigo de Esperanto. Li estis aŭtoro de „Úplná methodická učebnice esperanta“ (Kompleta metodika lernolibro de Esperanto), de „Vortaro bohema-esperanta“, de la ĉeĥa traduko de Fundamento de Esperanto kaj de la traduko de „Sherlock Holmes en servo de la hispana trono“ (František Lelíček ve službách Sherlocka Holmesa) de Hugo Vavris.

Eduard Kühnl estis studento de la Ĉeĥa teknika altlernejo, li rapide sciis akiri aŭtoritaton, kiun li iom tro ŝatis. Kiam estis necese fondi centran landan asocion, E. Kühnl fondis en 1907 „Bohema Unio Esperantista“ kun gazeto Časopis českých esperantistů (Bohema Revuo

Esperantista). Sed en la Union li ne akceptis esperantistojn, kiuj ne aprobis liajn ideojn kaj tial estiĝis ankoraŭ alia „Bohema Asocio Esperantista“ kun gazeto Český esperantista (Bohema Esperantisto). Ankaŭ apud nia „Esperantista Klubo en Praha“ (Klub esperantistů v Praze) formiĝis en 1908 nova loka organizaĵo „Bohema Societo Esperantista en Praha“ (Česká společnost esperantistů v Praze).

En 1914 E. Kühnl forvojaĝis al Parizo por partopreni la tiean Universalan Kongreson. Sed pro la eksplodo de la unua mondmilito la UK ne okazis kaj Kühnl ne sukcesis reveni en Pragon. Li restis en Hispanio, kie li ellernis la hispanan lingvon kaj tial post la milito li laboris kiel oficisto en ĉeĥoslovakaj ambasadoj en hispanlingvaj landoj. Tuj post la mondmilito li estis la unua oficisto de la ĉs. konsulejo en Barcelono kaj poste en Madrido, poste li estis oficeja gvidanto de la ĉs. ambasadorejo en Santiago de Chile, en la jaroj 1942 – 1947 li estis la ĉs. ambasadoro en Havano, Kubo, poste en Limo, Peruo. En sian patrujon li revenadis nur por libertempi, kaj li ne plu havis kontaktojn al la ĉs. E-movado, al kiu li ne plu efikis malakordige. Nur en 1966 subite venis letero el Nov-Jorko, en kiu E. Kühnl demandis pri la stato de la E-movado en Ĉeĥoslovakio. Sed antaŭ ol oni povis respondi al li, venis alia sciigo, nome ke Eduard Kühnl mortis la 23-an de majo 1966.

Libro „Unio proksima kaj malproksima“

Tomáš Břicháček



Fine de aprilo, mallonge antaŭ la deka datreveno de nia aliĝo al la Eŭropa Unio aperis mia libro „**Unio proksima kaj malproksima**“, kiun eldonis la Instituto de Václav Klaus.

La libro estas polemiko pri la nuna stato de la eŭropa integriĝo, sed mi ne forgesis skribi ankaŭ pri Esperanto. Fakte la lasta vorto en la libro apartenas al ĝi. Ĉu vi ne kredas? Do legu kaj vidu!

El la antaŭparolo:

Antikva mito, kiu reflektis en la nomo de nia kontinento, kaj kies bildo troviĝas kromalie en la greka flanko de la dueŭra monero memorigas forrabon de ĉarma fraŭlino Eŭropo per la dio Zeŭso metamorfozita en taŭron. Tiu scenaĵo, kiu depratempe inspiris pentristojn kaj skulptistojn, donas taŭgan analogion por nia nuna situacio. Eŭropo kvazaŭ denove estus viktimo de unu granda forrabo. Ŝian nomon hodiaŭ pretendas tiuj, kiuj identigas ĝin kun unuiĝo de eŭropaj landoj en ununura ŝtato regata el unu centro, kun potenco de komunaj institucioj, kun ekspansio de centra regulado. La vorto "poreŭropa" aŭ "eŭropano" en ilia mondkoncepto kaj ilia manipulema lingvo signifas subtenanto de la ideo de la eŭropa ŝtato, "pli da Eŭropo" signifas pli da potenco al komunaj institucioj, fine "kontraŭeŭropa", "eŭroskeptiko", aŭ "eŭrofobo" estas tiu, kiu malkonsentas kun ilia vizio. Margaret Thatcher foje protestis kontraŭ tiu alproprigo de "Eŭropo": *"Ni ne lasu tiujn, kiuj subtenas la ideon de la federacia Eŭropo, ŝajniĝi, ke ili estas iel pli eŭropaj ol la resto de ni. Ili tio ne estas; ili estas nur pli federaciemaj. La federacia strukturo estas nenio specife eŭropa – la malo fakte estas vera: se io estas eŭropa, do ĝi estas nacio-ŝtato."* Preskaŭ kvarono da jarcento post kiam eksonis tiuj vortoj, Eŭropo estas ankoraŭ firme en la potenco de la sovaĝa taŭro, kiu ĝuste nun sentas sin en plena forto.

La libro, kiu malfermiĝas antaŭ la leganto sekvas la paŝojn de tiu taŭro el nia analogio. Ĝi reprezentas polemikon pri la eŭropa centraligo, ĝia amplekso kaj konsekvencoj [...]

La unua parto de la libro nomata *Unio proksima* celas montri, ke la EU havas gravan influon sur la ekonomia kaj socia realeco ĉirkaŭ ni. Estas certa "anatomio" de eŭropa centraligo, kiu koncentriĝas sur ĝiaj specifaj simptomoj, la kialoj de ĝia malfacila videbleco, ĝiaj autaŭkondiĉoj kaj ideologia bazo. La intenco estas demonstri la ĉieestecon de la unia regulado, amplekson kaj fuŝkonturecon de uniaj povoj, unudirekta centraligema enpoziciigo de la baza kadro de eŭropa integriĝo kaj pri la ideologio de "ĉiam pli proksima unio", por kiu la centraligo estas valoro ĝi mem.

La dua parto, *Unio malproksima*, starigas en kontraston al la proksimeco del influo de la EU ĝian distancon koncerne la ŝancon de civitanoj partopreni en la politika vivo. Oni montras kiel kaj kial „Bruselo“ estas tre malproksima, se ni provas influi politikajn decidojn prenataj sur ĝia nivelo, do precize tiuj decidoj, kies konsekvencoj estas proksimaj kaj ĉieaj. Oni traktas ankaŭ la temon de la demokratia legitimeco de la decidofarado pri publikaj aferoj en la Unio. Oni defendas la tezon, ke sur la nivelo de la Unio de sia propra naturo ne povas funkcii reala demokratio kaj surbaze de tio serĉas limojn por la ideala amplekso de Uniaj povoj.

La tria parto projekcias la sentempajn temojn rilatajn al la centraligo kaj la malproksimiĝo de politika decidofarado en aktualajn kaj specifajn konkretaĵojn en diversaj areoj kaj aspektoj de la agado de la Unio. Temas kromalie pri ŝanĝoj en la strukturo de la ekonomia kaj mona unio rezultintaj el la ŝuldo-krizo, pri la nuna stato de la interna merkato kaj pri la agado de la EU en la kampo de la socia politiko kaj pluraj novaj iniciatoj, kies adopto havus gravajn sekvojn.

La lasta parto alportas okaze de la deka datreveno de la aliĝo de Ĉeĥio al la EU retrorigardon al la pasintaj jaroj de nia membriĝo en formo de partaj observoj kaj rememoroj kaj poste kelkajn konsiderojn pri la nuna situacio kaj pri la demando kien en tiu ĉi momento devus la kontraŭuloj de centraligo en Ĉeĥio koncentri siajn fortojn.

El la dua parto:

Úroveň Unie je pro občana ve srovnání s národním státem velmi vzdálená, pokud jde o možnost sledovat a ovlivňovat rozhodovací procesy a kontrolovat politické zástupce, respektive obecně o možnost účastnit se politického života. Tato vzdálenost vyplývá mimo jiné ze skutečnosti, že se rozhoduje v rámci většího a vnitřně nesourodého celku, z neexistence jednoho veřejného prostoru, ze složitosti a nepřehlednosti institucionálního rámce Unie, zeměpisné vzdálenosti či jazykových překážek.

Na úrovni Unie ze své podstaty nemůže fungovat skutečná demokracie, jakkoli jsou zastánci „stále užší Unie“ přesvědčeni, že recept mají. Jejich všelék spočívající v posilování moci Evropského parlamentu je založen na umělém konstruktu evropského lidu jakožto souboru občanů členských států a na představě možnosti realizace vlády tohoto lidu v ústřední roli přímo voleného zákonodárného sboru. Vychází z ryze formálního výkladu definičních znaků demokracie a je proto hrubě zjednodušující a povrchní. Jeho realizace nijak neřeší problém vzdálenosti Unie od občana ve shora uvedeném smyslu.

Zabýváme-li se pravou podstatou pojmů lid a vláda v definici demokracie, narážíme v případě unijní konstrukce na problémy u obou těchto složek. Unie jednak nemá politický národ (demos) jakožto sourodé společenství občanů spojené vědomím sounáležitosti, společné identity, solidarity, patriotismu, na němž by stála. Nominální občané Unie jsou příslušníky svébytných politických národů, které nesdílejí společný jazyk, společné vnímání historie, pocit kolektivní identity a loajality, a mezi nimiž jsou kulturní, sociální a ekonomické rozdíly. Tyto národy si přejí nadále přijímat vlastní zákony, rozhodovat o své vlastní vládě, o správě svých věcí; chtějí být dobrými sousedy, ne spolubydlíci. Navíc

v nesourodém mezinárodním prostředí si obyvatelstvo jako celek sotva může efektivně vládnout prostřednictvím zvolených zástupců. Nemůže se zde vytvořit jeden veřejný prostor, v němž probíhá diskuse o společenských otázkách a soutěž politických programů. Nevznikají zde skutečné politické strany, ale jen programové volné konglomeráty národních politických stran. Volby do Evropského parlamentu jsou v praxi soutěží národních politických stran a jejich domácích programů. Sám Evropský parlament jakožto mohutný mnohonárodní a mnohojazyčný kolos složený ze zástupců desítek vnitrostátních politických formací je odsouzen k těžkopádnosti, omezené funkčnosti a programové nevyhraněnosti.

Travivaĵoj el Bruselo

Jiří Galuška

Mi nomiĝas Jiří Galuška kaj nuntempe mi laboras ĉe financministerio de Ĉeĥa Respubliko. En tiu ĉi artikolo mi volus deskribi mian restadon en Bruselo. Mi decidis staĝi ĉe Eŭropa Komisiono baze de vizito ĉe mia amiko. La amiko en tiu kazo estis neniŭ alia ol la tre fama ĉeĥa esperantisto Marek Blahuš. Tiutempe li estis staĝanto ĉe Ĝenerala direktorejo por interpretado (DG Interpretation) kie li organizis videokonferencajn ekzercojn por studentoj de interpretado kaj profesiaj interpretistoj de EU kaj proponis novigon de multlingva datumbazo de registritaj modelaj paroladoj.

Mi tute ĝuis mian unuan restadon en Belgio kaj mi komencis pensi pri propra staĝado. Eŭropa Komisiono por staĝo preferas homojn kun internaciaj spertoj, do mi decidis partopreni en la interŝanĝa programo Erasmus en Konstanz, Germanio. Mi longdaŭre atendis por rezulto de mia aliĝo kaj komence de Januaro mi ricevis oferton por labori kiel staĝanto en Kontrola kaj dogana departamento de Ĝenerala direktorejo por buĝeto (DG Budget). Mi longe antaŭĝojis la estadon en Bruselo kaj mi tuj kontaktis mian mentoron kiu nomiĝis Tino. Fine de Februaro miaj gepatroj alvenis al Konstanz kaj alportis al mi printempajn kaj somerajn vestaĵojn, ĉar mi ekspektis mildan veteron en Bruselo, kaj la plej varmajn vestaĵojn ili veturigis reen al Ĉeĥio (sed la ideo evidentiĝis granda eraro – mi certas, ke la printempo 2013 apartenis al la plej malvarmaj en la tuta historio de Belgio)

En la 28-a de Februaro posttagmeze mi longe adiaŭadis miajn amikojn kaj je la oka forveturis mia trajno al Bruselo. Mi devis ŝanĝi trajnon trifoje kaj inter Germanio kaj Belgio mi vojaĝis perbuse. Matene mi alvenis al Bruselo kaj apud la stacio de metroo atendis min aĝa virino kun sia Toyota. Ĉe la virino mi loĝis kvin monatojn. Ŝi devenis de Kinŝaso en Kongo, sed ŝi ne aspektis kiel Afrikanino. Ŝia familio venis al Kongo komence de la 20-a jarcento kaj dum la interna milito en Kongo ili reelmigris al Belgio. Ŝi parolis nur france kaj iomete angle. Tio signifis grandan komplikajon por ni, ĉar mi tute ne konis la francan lingvon. Bonŝance ni trovis vojon por solvi problemojn en komunikado per montrado.

Mi komencis labori nur en la 7-a Marto. Antaŭe mi devis fari multajn administrajn taskojn. Nur post unu semajno la laboro startis. Mi preparis diversajn aĵojn por inspektoj en membroŝtatoj de Eŭropa Unio. Baze sur miaj analizoj, en kiuj mi serĉis suspektindajn datumojn, kolegoj faris proprajn inspektojn de funkciado de dogandeprenaĵoj. Unue ili preparis planon de kontrolo en komuna kunveno kun direktoro de la sekcio kaj poste ĉiam du oficistoj veturis al iu membroŝtato por unu semajno, kie ili realigis kontrolon surlokan. Fine ili faris raporton pri ĉiuj taskoj ekde la komenco ĝis la fino de la inspekto. Kiam ili trovis iajn erarojn en agado de la membroŝtato, ekspliko de la naciaj ministerioj estis petita. Se poste nia departamento pensis, ke la ekspliko ne sufiĉas, ili komencis procezon por gajni la mankantan monon. Inter miaj kolegoj estis ankaŭ juristoj kiuj decidis pri kulpo de membroŝtatoj. Krom tio, mi plenumis aliajn interesajn taskojn, ekzemple fari diversajn analizojn kaj statistikojn por Eŭropa Revizora Kortumo, kiu kontrolis la agadon de nia departamento.

Mia oficejo situis eble 200 metrojn de la konstruaĵo Berlaymont, kie troviĝas la ĉefa sidejo de la Komisiono kaj kie laboras ankaŭ la estro de la Komisiono, sinjoro Barroso. Ni iris regule manĝi tien kaj oni aranĝis tie renkontiĝojn kun la ĉefa kaj la slovaka EU-komisionanoj.

Mi tre ŝatis la liberan tempon en Bruselo. La labortempo daŭris de la 9-a horo ĝis 17:30. Nur poste komenciĝis la vera vivo de la staĝantoj. Oni organizis kvazaŭajn subkomitatojn, kiuj sin dediĉis pri diversaj temoj. La plej gravaj celiĝis al edukado de lingvoj (bedaŭrinde neniu tiufoje proponis iun por Esperanto) kaj al organizo de laborfoiro. Aliaj ebligis sportumi aŭ vojaĝi al la plej famaj urboj kaj lokoj en Belgio. Krom tio ni povis viziti tre interesajn prelegojn en Eŭropa parlamento, kie mi partoprenis tiujn kun ekologia temo.

Mi devas mencii, ke mi iom parolis ankaŭ Esperanton. Mi havis eblecon por renkonti kelkajn esperantistojn – Peter Baláž kaj Maja Tišlar, kiuj tiutempe estis en Bruselo pro sia projekto. Poste mi renkontis ankaŭ la bruselanon Laŭr' kun lia Esperanto-parolanta familio, kiuj fakte multe helpis al mi kun diversaj problemoj. Mi kompreneble invitis Marek Blahuš por viziti min kaj kun li mi vojaĝis tra Belgio dum lia restado kiu daŭris kvin tagojn. Li volis veturi al lokoj kiujn li ankoraŭ ne vizitis. Tial ni estis en la historia urbo Ieper (france: Ypres) aŭ en urbeto Comines kiu apartenas parte al Francio, parte al Belgio. Krom tio, ni kelkfoje ĝuis belegan naturon en la Ardenoj. Plie mi volus diri, ke mi trovis multajn novajn amikojn. Ĉiuj staĝantoj de Ĝenerala direktorejo por buĝeto kreis perfektan grupon. Ni preskaŭ ĉiudimanĉe kunvenis ĉe Jacopo (staĝanto el Pescara), kiu preparis bonegajn italajn pastaĵojn kaj ni trinkis tion kun la famega belga biero. Vespere la viroj (la grupo enhavis kvin virojn kaj ses virinojn) rigardis kune matĉojn de la Ligo de Ĉampionoj. Ĵaude la grupo iris al la placo Place de Luxembourg, kie multaj oficistoj kunvenas post la laboro. Sabate ni foje kune vojaĝis, sed regule ni tiutage iris al hispana drinkejo, kie ni spektis piedpilkon, trinkis malmultekostan bieron kaj manĝis fiŝojn, ŝinkojn aŭ marfruktojn.

Lastaj tagoj de mia tempo en Bruselo estis la plej belaj, sed ankaŭ la plej tristaj. La vetero boniĝis kaj la temperaturo fine de Julio atingis 38 gradojn. Ni aranĝis vesperajn eventojn ĝis la dekunua horo, ĉar ni ne havis plu taskojn en la laborejo (multaj oficistoj forveturis pro ferioj). Mi trovis tre interesa, ke noktiĝis maljam post la dekunua horo. Bedaŭrinde, laŭvice komencis la staĝantoj foriri. Nur kelkaj trovis laboron en Bruselo, pro kio preskaŭ ĉiuj revenis al siaj hejmlandoj. Mi forveturis kiel unu de la lastaj. La ĉiutagaj adiaŭoj estis tre malfacilaj. Finfine en la 31-a de Julio mi trinkis lastajn kafojn kiu miaj kolegoj kaj la sekvan tagon en la 1-a de Aŭgusto mi eniris en buson kaj post dek du horoj mi alvenis al Prago.

Mi volus konkludi dirante, ke mia restado estis perfekta. Mi tute rekomendas al ĉiuj provi kandidatiĝi por staĝo ĉe Eŭropa Komisiono.

Templeton-premio por Halík

Jiří Patera

La ĉeĥa katolika pastro Tomáš Halík ricevis en Londono prestiĝan Templeton-premion por la jaro 2014, pro siaj spiritaj aktivecoj. Li estas profesoro en la Karola Universitato en Prago, prezidanto de la Ĉeĥa Kristana Akademio kaj paroĥestro de la Akademia Paroĥo en Prago. Li estas preleganto kaj verkisto, aŭtoro de vico da libroj, el kiuj multaj estis tradukitaj en pli ol dekon da lingvoj. Malgraŭ sia klereco li iam esprimas sin tute malklere, kiam li mencias esperanton. Ekz. en intervjuo kun ĵurnalisto li diris, ke *„intenci anstataŭi plurismon per unu lingvo aŭ per universala religio estas sensencaĵo, el tio estiĝas impotentaj formoj kiel esperanto aŭ klerisma deismo; religio samkiel lingvo ne estas nur instrumentoj, ili estas naturaj kulturmondoj.“*

Alia lia eldiro tekstas: *„Se la vasta dialogo kun nekristanaj religioj baziĝus nur sur la naiva entuziasmo sen skrupula studado de fontoj kaj de arto interpreti tekstojn en iliaj kulturaj kaj historiaj kontekstoj, kondukos tio rapide al gulaĝo de ekzoterismo kaj kiĉa religia esperanto, de kiu estas plenaj la diversaj rondetoj de teozofoj, New Age ktp.“*

Nemirinde, ke multaj ĉeĥaj kleruloj aprezas la agadon de Halík tre kritike, por iuj konservativaj katolikoj li estas herezulo, por la ĉeĥa eksprezidento Klaus li estas Koniáš, t.e. la 18-jarcenta ĉeĥa jezuito, kiu bruligis milojn da ĉeĥaj nekatolikaj libroj. En la pasinta novembro estis 14 verkoj de Halík forigitaj el Registro de informoj pri esplorado, evoluado kaj novenkondukado, ĉar faka komisiono konstatis, ke la verkoj de Halík ne havas sciencan nivelon.

La Templeton-premion por Halík reprezentas ĉeko por 36 milionoj da ĉeĥaj kronoj. Tio signifas, ke Halík povas financi la nove fonditan Instituton por Dialogo ĉe la Ĉeĥa Kristana Akademio. La Instituto antaŭ ĉio subtenos ekumenan kaj interreligian dialogon samkiel inter kredantoj kaj sekularaj humanistoj, sed ankaŭ subtenos la studadon de etikaj kaj spiritaj aspektoj de la vivo de nuntempa socio en la kulturo, scienco, politiko kaj ekonomio.

Esperantistoj, gardu vin!

Ondo super ondon ascendas

Věra Ludíková¹

Mi estas dankema al la sorto, ke mi en la vivo renkontis kardinalon Tomáš Špidlík, ke mi ekkonis lin persone, ke mi povis esti tiu, kiun la sinjoro kardinalo bonvenigis laŭvorte per malfermitaj brakoj, bonkore li ĉirkaŭprenis min, firme kaj longe premis la manon kaj per vortoj esprimis sinceran ĝojon, ke li min persone ekkonas. Ĉe ripetita renkontiĝo la bonvenigo fare de la sinjoro kardinalo estis ĝuste tiel bonkora, mi eĉ havas la senton, kvazaŭ tio estus hieraŭ – pri specifaj okazintaĵoj oni ne forgesas...

Pro kio mi meritis tiel grandan honoron, mi demandis min mem, per kio mi sukcesis la sinjoron kardinalon tiom altiri, ke li ofte skribis al mi kaj miajn leterojn li ĉiam tuj respondis – kaj la leteroj el Romo estis ankaŭ miaj plej oftaj korespondaĵoj, kiujn mi kun superbaj sentoj malfermadis... Li fidis al mi, kredis la forton de mia preĝo kaj multfoje li skribis al mi, ke mi preĝu por li, ke mi elpetu sanon por li.

Supozeble ĝi estis metaforo, kiu spontanee eniĝis en la frazojn de miaj leteroj, ĉar la esprimado per metaforoj estas proksima al mi, eble ĝi estis iu mia teksto, kiun mi almetis al letero por la sinjoro kardinalo, aŭ ekinteresis lin mia strebo ne rezigni kaj per vorto kuraĝigi kaj neniam en la vivo ion demeti – sed io certe estis, kio min en la okuloj de la sinjoro kardinalo altigis en la rondon de liaj amikoj.

La proksimaj animoj povas esti reciproke distancaj en la tempo kaj en la spaco, sed kiam ili renkontiĝas, ili baldaŭ de malproksime rekonas sin. Ĝi estas sento malfacile priskribebla kaj eble eĉ malfacile komprenebla, samkiel estas por iu malfacile percepti la ĉiubrakuman amon, la amon sen pretendoj je reciprokeco, la amon senegoisman, la amon, super kiu ni staras mirigitaj kiel super la ĉiela bluo, kiel super la neesprimebla beleco...

Mi tre ŝatas ne nur la oftecon de leteroj kaj mesaĝoj de la sinjoro kardinalo, sed ankaŭ lian sincerecon al mi kiel al iu proksima. Mi rememoras lian plendeton, kiel fortostreĉa jam estas por li la longeco de ortodoksaj mesoj; el ĵurnaloj mi plie eksciis, ke dum la ekumena renkontiĝo kun la serba patriarĥo ĉe konsekrado de nova ortodoksa preĝejo en Ljubljano la liturgio daŭris kvar kaj duonon da horoj. Ĉe tiom longa starado tion liaj gamboj ne eltenis, estiĝis el tio danĝera trombozo kaj la sinjoro kardinalo aperis en kliniko...

Kvankam la sanproblemoj la sinjoron kardinalon ne evitis, li estis ĝis alta aĝo, ĝis la lasta momento nekredeble agema, multe li vojaĝis, prelegis en signifoplenaj mitingoj kaj en universitatoj, paroladis al politikistoj kaj celebris mesojn, ĉe tio li kompreneme interesiĝis pri ĉio, kio subtenus bonajn rilatojn inter homoj, inter kristanoj. Kaj antaŭ ĉio li tre plezure vizitadis Pragon...

¹ Rememoroj pri sinjoro kardinalo Tomáš Špidlík

El liaj korespondaĵoj estis evidente, ke la ofta skribado de leteroj kaj sciigoj kaŭzis al li ĝojon, ke sciojn kaj sentojn li volonte komunikas kaj ke li mem estas apud pastro kaj scienculo ankaŭ literaturisto kun poezia animo. Pri mi povas mi diri, ke ankaŭ mi ŝatas vaste skribi kaj estas nur domaĝe, ke la permanente skribataj leteroj fariĝas maloftaj, eĉ se ili kapablas tiom diri pri la skribinto...

La edifa sento de proksimeco kaj la konscio de reciproka aparteneco estas por mi tre gravaj. Ne malhelpas eĉ la distancoj de kontinentoj. Mi scias, ke la proksimaj amikoj ne sopiras pri rekono kaj pri admiro, ne pretendas la rajton iun posedi. Tiajn sentojn mi havis dum la konatiĝado kun la ideoj de kardinalo Špidlík, kromalie en la tekstoj, kiujn eldonadis la Kristana akademio en Romo.

Lia libro SUR VIAJ PADOJ komenciĝas per vortoj: “Konkerantoj kaj malkovrintoj boras al si vojojn novajn. Sed pilgrimantoj preferas iradi sur vojoj jam piedpremitaj. Tiakaŭze, ke la malnovaj vojoj kaj malnovaj amikoj estas plej bone pruvitaj. Ĉu la vivo de la homo estas pilgrimado, aŭ pli vere esplorado de konkeranto, la malkovranto de novaj horizontoj? Ni vivas en la tempo de grandaj renversoj. Tial ŝajnas al ni la miljaraj elprovitaj padoj tro mallarĝaj, malkomfortaj, malrapidigaj... La nuntempa devojiĝo ne estas nur momenta promeno, ĝi estas la irebligo de nova direkto. Kaj la milionoj de estontaj homoj foje demandas nin: „Kien vi alkondukis nin?” Ni estas certaj, ke ni ne perdis la direkton kaj ne kondukos la homamasojn en dezerton, kie iompostioe formortos niaj civilizo, kulturo kaj ankaŭ spiritaj valorajoj?...”

Tiuj vortoj estis proksimaj al mi, tial mi aŭdacis antaŭ jaroj al la sinjoro kardinalo skribi kaj la leteron mi adresis en Vatikanon. La respondo mi ne devis longe atendi kaj per tio komenciĝis la vico da belegaj jaroj de nia reciproka korespondado.

Al la sinjoro kardinalo mi skribis pri tio, kion mi ĝuste preparas, kiajn programojn mi pretigas kaj kun kiaj komprenoj de legantoj kaj aŭskultantoj mi renkontiĝas; tio estas, ke ĉiuj ĉi sciigas al mi, kiom bezonaj estas por ili la esperigaj vortoj, kiel ili elserĉas ilin. La sinjoro kardinalo inspiris min al mia agado kaj informis min, ke miajn librojn, poemojn kaj tekstojn li kun intereso tralegas. Li skribis al mi pri siaj renkontiĝoj en eksterlando kaj ankaŭ ĉe ni hejme kaj tre volonte li rememoris pri Prago.


(En letero de la 31-a de junio 2009 al V. Ludíková kardinalo Špidlík skribis: „Mi dankas por la letero kaj por „Esperanto“. Kiel studento mi ankaŭ komencis lerni, sed poste mi forgesis... Pardonu, ke mi skribas mallonge. Morgaŭ mi forveturas en Kroation, kie mi devas lerni iradi kun lambastonoj. Kun Kristo T. Špidlík.)

(Esperantigis Jiří Patera)

Se mi eble ne revenus...

Jiří Karen²

Hradec Králové



Kara Karlo, Karlo Foustka, treege vi ĝojigis min, ke vi atendis min en la fervoja stacidomo, ke vi min tiel surprize atakis, ĉirkaŭprenis, ke vi kunprenis min ĉe vin; ke mi estis ĉe vi kiel hejme. Smiřice estas bela nesteto por tiu, kiu ne loĝas tie, vi diris al mi. Unu horon daŭras via irado en hospitalon. Mi rakontas al vi pri miaj travivaĵoj en la regno, mi rakontas, kion oni skribi ne povas. Mi pri murdado kaj pri mortintoj. Vi pri la hospitalo. Vi ŝatas vian kuracistan laboron, dume studi vi ne povas, sed en la hospitalo vi preparas vin, vi iros studi post la milito. Eble pro tio ni, Karlo, tiom komprenas nin reciproke, ke ni scias, kion ni volas, kio ni estos, kion ni devas fari.

Komune nin plezurigas kaj kuraĝigas la studado. La studado libervola, je tio pli interesa, ke ni ne ricevas notojn, tiujn donas al ni la vivo mem. Mi amas vin, vi ankaŭ estas tia legemulo. Kaj vi ŝatas la poezion. Vi ja ne verkas, sed legas ĝin. Kaj kun komprenemo vi legas. Kaj kuraĝigas min. Vi montris al mi en subtegmentejo de via domo vian sekretan kaŝejon, kien vi kaŝas miajn kreaĵojn kaj pluajn objektojn, kiujn ne rajtas vidi eĉ gepatroj. Vi estis rakontanta al mi kun fervoro. Mi ŝatis aŭskulti vin. Vi kapablas halti kaj enpensiĝi super ĉiu ŝtono kaj arbo. Pri ĉiu bagatelaĵo, pri ĉiu natura fenomeno vi scias tiom multe. Kaj kion nur, kiam vi ekparolas pri via medicino. Mi amas vin. Mi multe dankas pro la modela regalo al via panjo. Mi scias, viaj gepatroj ne plu estas junaj, ili havis vin malfrue. Pro tio ili tiom timas pri vi. Salutu vian rideteman panjon, salutu vian seriozan paĉjon, kiun oni preskaŭ timus, se mi ne sciuas de vi, ke li estas bona ulo. Ĉagrenas lin, ke li havas sur la kapo nur kelkajn haretojn. Ho, kiaj zorgoj, tiajn mi volus havi. Kaj mi tre dankas ankaŭ al Milan Obst, ke li venis viziti min, ke ni povis iomete babili pri poezio, pri tio, kion, kiu kaj kiel verkas ĉe vi, ke Ŝotola multe progresas, ke Jiří Morávek, kiu pentras, havis etan ekspozicion en loka galerio, ke vi preparas gazeton, ke vi eldonos ĝin, nur kiam por tio estos konvena tempo. Vi min ankaŭ ĝojigis, ke vi ne rezignis kaj la klubo Venkinto, dispelita, malbenata de la direktoro kaj de kelkaj gepatroj, jam denove sekrete kunvenas. Dume en malgranda nombro, sed tamen. Kaj ke vi havos multajn kontribuaĵojn, kaj ke la gazeto eldonota de vi, havos la nomon Spegulo. Jes, ĉiu en ĝi vidu sin, kia li estis, ĉu kuraĝa aŭ timema. Mi komprenas, ke el la gimnazio oni sendis al mi sciigon, ke mi ne venu tien, ke tio ne devus fari bonan impreson, jes, mi komprenas, ke mi ne povis sukcesi per mia petskribo, ĉu mi dum libertempo povus plenumi ekzamenojn el la temoj de la kvina klaso kaj

² Korespondaĵoj el Germanio el la milita tempo

eble eĉ el instrutemoj de la sesa klaso. Certe mi ne ĉion havus kun eminenta noto, tamen mi almenaŭ iom movus la studojn. Tio ne eblas, mi komprenas, oni devas peti en Prago ĉe centraj oficejoj, sed tio povus vekti atenton pri mi, pli bone estas lasi la aferon dormi, aŭ

ke mi tion prizorgu en Prago en la oficoj. Mi entreprenis tion en Prago kaj ĉu vi scias, kiel tio finiĝis? Malbone. Mi iras en la ministerion de instruado. Al kiu vi iras? Kiu vin sendis? Mi diras, ke mi volus permeson plenumi ekzamenojn en la gimnazio en Hradec, ĉu en la kvinan, eventuale eĉ en la sesan klason. Mi havis tion surpapere, mi transdonis tion al li. Skribu al mi avizkarton. Vidinte, ke mi estas total-laboranto el la regno, li forprenis la karton, sarkasme li ekridis kaj diris: „Ĉu vi freneziĝis, homo?“ Kiam li vidis mian disreviĝon, li sendis min al n-ro 18. De tie oni sendis min al n-ro 24, de tie al n-ro 31. Tie dediĉis sin al mi iu homo, li estis tre ĝentila, li diris al mi, ĉu mi ne irus kun li tagmanĝi, ke li volas al mi klarigi la aferon; ĉi tie en la edificio li ne povas paroli. Laŭdire li laboris en Kladno kaj scias, ke mi verkas poemojn. Mi ne memoris lin, lia nomo estis por mi tute fremda. La tagmanĝo estis satiga. Li demandis pri la situacio en Regno. Multon mi ne diris al li, ĉu mi povus kredi al li? Li volis scii mian opinion pri tio, ĉu la situacio en la regno estas trankvila, aŭ ne, li demandis ankaŭ pri militkaptitoj kaj ĉefe pri prizonuloj. Mi diris al li malferme, ke jes, sed ke la situacion en la regno havas la nazioj firme en la manoj. Interparolo kiel en nebulo.

Mi vizitis la direktoron de la seminario. La seminario estis praktike likvidita. Kiuj finis la studojn, estis ordinitaj kaj foriris al paroĥa administraro, la ceteraj estis totale laborigitaj. La seminario disfalis. Kio estos post la milito? Sinjoro direktoro bonvenigas min tre ceremonie, sed iom fremdece. Mi salutas, li mute kapjesas. Do rakontu, kiel vi tie fartas. Mi rakontas pri la peza vivo, pri tio, kiel ni klopodas vizitadi preĝejon, kiajn spertojn mi akiris dum vizitoj de paroĥaj oficejoj. Sed iel mi havas nenion por rakonti. Mi sentas, ke malantaŭ la ĝentileco estas demando: kaj kiajn planojn havas vi, knabo? Mi opinias kiel por la futuro? Mi sentas, ke la direktoro estas pri ĉio, kion mi faras, detale informita de miaj kolegoj. Ili zorge prirakontis miajn strebojn agi aktive inter nereliguloj kaj alireliguloj, miajn opiniojn pri la eklezio, miajn kritikojn, ankaŭ la paroĥestro diligentis, ankaŭ li skribis siajn impresojn. Kion do diri, kiam egale oni ĉion jam scias, kaj kiam oni tion scias pli bone, ol scias tion mi mem. Ĉu mi povus dispeli liajn timsentojn? Eble ne. Sed tiam certe devus mi plendi kontraŭ aliaj, tiam mi devus promesi aferojn, pri kiuj mi scias, ke mi ne plenumos ilin. Ne, mi promesos nenion, nenion mi ankaŭ defendos, nenion mi denuncos, ĉi-kaze la vortoj estas vanaj. Mortintoj devas sepulti mortintojn kaj vivantoj devas vivi kun vivantoj. Bone tion diris nia paroĥestro, ke la aferojn oni devas lasi maturiĝi.
(...)

(Finota)

(Tradukis Jiří Patera)

Kvildo, mia amo

Delicie Nerková³

Miaj amoj, mi opinias la homaj, ĉiam estis pli vere nur naivecaj bildetoj, neklaraj fotoj super lito, versetoj de memorlibro en la memoro. Post paso de tempo oni forgesas, kio propre estas en la kadretoj sur la muro, forgesas, kiel aspektis tiu, kiu sin subskribis en la memorlibron, la nomo ne plu ion memorigas, nur ie malantaŭ la okuloj restas neklara spuro. Sed iam okazas, ke vi enamiĝas por ĉiam.

Jam kiel malgranda knabino mi komprenis, ke mi nesufiĉe vidas, kaj ke neniam estos pli bone. Mi timis, ke mi ne plaĉos al infanoj, kiuj vidas normale. La antaŭtimo estis prava. Precize tiel tio funkciis en Prago. Sed ankaŭ estis ĉi tie Kvildo...

Paĉjo aĉetis per la mono, kiun li ricevis pro la filmo Reĝo de Ŝumavo, duonruiniĝintan kabanon post germanoj. Ĝi havis kelkajn ĉambrojn, la ĉefa estis tabua – la laborĉambro de paĉjo. La blindeta infano iam haltis en la pordo kaj per senfortaj okuloj sekvis la ĝibetan silueton de paĉjo intensive frapantan en skribmaŝinon. Tiomfoje mi volis diri al li multon da aferoj. Sed tio ne eblis, li vivis por Ŝumavo en la centro de Ŝumavo, li vivis por Kvildo en la centro de Kvildo, sen leviĝi de la skribotablo. Jes, ekzistis esceptoj, plej verŝajne vendrede vespere, tiam viroj iris sidigi sin en gastejon post la tutsemajna laborego. Tie li ne rajtis foresti. Li estis societema kaj la viroj ŝatis lin, ĉar estis amuzo kun li kaj ĉar li ne estis avara. Li trinketis tie el bierglasoj kaj el brandglasetoj sian inspiron. Drinkado lin neniam ĝenis, neniam li ebriiĝis tiel, ke tio iun pereigus. Proporcie kun la kvanto da drinkado li ensorbis historietojn, okazintaĵojn kaj legendojn rakontitajn ĉe gutmakulita umakarta tablo. Kvankam intelektulo kaj iama mezlerneja profesoro pri latino kaj historio, al lokaj homoj li trovis vojon. Ili rakontis, dum li ensorbadis.

Kvildon li neniam forlasis. Esceptokaze de tempo al tempo li forveturis per nia nova aŭtomobilo Spartak aĉetitan pere de distribua asigno. Sed tiuj liaj forveturoj estis neniel dramecaj – plej malproksimen al Sušice por grandaj aĉetoj, veturi ien prelegi al soldatoj pri la socialisma kulturo kaj pri propraj verkoj, eventuale en Pragon por ia verkista aŭ filmista kunveno. Li revenis ĉiam tiel rapide, kiel nur estis eble. En Kvildon, estas klare.

Kiel al solinfano miaj gepatroj disponigis al mi ĉion, kio estis tiutempe havebla. Tamen mi ĉiam estis interne iel dankema pro ĉiu homo, kiu akceptis min sincere kaj sen rezervoj. Mi estas certa, ke tiu ĉi dispozicio jam restis al mi. Tio ne estas malutila, precipe se oni iam sentas sin iom sola.

Kiam paĉjo kun panjo jam kontentiĝis kun tio, ke mi neniam vidos pli malproksimen ol al la distanco de etendita brako, ili decidiĝis, ke pluan posteulon kun viddifekto ili ne riskos. Kaj tial mi mian hejman solecon kompensis per ĉiuspecaj kaj ĉiam gravaj amoj. Kvildo estis, estas kaj estos la

³ Dediĉita al Světlana Petkovová – Kalčíková

plej granda. Mi estis unujara, kiam mi venis tien unuafoje. Mi estis kvindekjara, kiam mi ĝin ĉi-dimanĉe por kelkaj tagoj forlasis.

Kvildo, tio estis etuloj samaĝaj kiel mi. Ili kunprenis min ĉien – sur sledo, sur kurskioj. Mi iradis kun ili pluki mirtelojn, fungojn. Fungojn mi vidis – laŭvorte nur la plejmulte kolorajn, kaj tiujn mi kolektis, por ke poste bubinoj kaj buboj dividu ilin je la manĝeblaj kaj venenaj. Aŭ ili sidigis min en mirtel-arbetaĵon kaj ordonis, ke mi eĉ ne moviĝu, por ne fali en marĉon. Tial mi sidis sur la loko kaj honeste deŝiris mirtelojn en ladpoteton. Post kiam mi mian agadradiuson senmirteligis, mi ekvokis aŭ ekfajfis, la kamaradoj helpis al mi trovi pluan bonegan lokon blukoloran pro mirteloj, kaj tial mi plukis kaj plukis, nur kiel tion la limzono permesis.

Hejme en la kabano dume panjo staris sur duobla eskalo kaj blankigis la ĉambron. Kiam ŝi ne blankigis, tiam ŝi segis kun najbaro lignon por forno. Kiam ŝi ne segis lignon, tiam ŝi sidis krurdismete sur tegmento kaj ion ŝi alnajlis. Ankaŭ ŝi staradis ĉe la forno kaj kuiris, aŭ ŝi transdonis brikojn al masonisto, kiu ĉe ni tiutempe ion konstruis. Ĉiumomente mi kunpuŝiĝis kun siteloj, diversspeca ilaro, neatenditaj amasoj da sablo kaj brikoj, puŝadis la prunteprenitan miksilon aŭ faladis en la ĵus elfositan rubkavon, do en la estontan kloakon. Kaj kion dume faris mia mirinda, joviala kaj klera paĉjo? Nu, li sidis ĉe tablo kaj lia iom ĝiba silueto leĝere skuiĝis kiel ĝi transigis la frapadon de skribmaŝino sur puran paperon.

En septembro paĉjo kutime restis en Kvildo kaj mi kun panjo migris en Pragon. Mi komencis viziti lernejon. Ĝi estis fino de paradizo, fino de ludoj kaj de nematuraj framboj, kiel diras poeto. Ĉu fakte fino?



En Kvildo mi neniam travivis ĉikanon. La infanoj, kun kiuj mi tie pasigis plejparton de la vivo, ne vidigis, ke mi ne estas en ordo. Jes, okazis, ke mi iam ien falis, ion renversis, je io min frapis. Sed tiaj aferoj okazis al ĉiu. Al mi eble iom pli ofte. En Prago mi estis evitinda idioteto, kiu ne vidas al tabulo, komprenu, ne scipovas legi. Mi ne kapablis de la tabulo kopii eĉ litereton, eĉ se mi sidadis en la unua benko. Dum skribado en kajero mi ne trafis liniojn kaj dum legado mi balbutis kaj legis kripligitajn stultaĵojn. Bubinoj min batis kaj buboj estis kompatemaj.

Paĉjo post tio, ke en Kvildo li preskaŭ frostmortis, ĉar neniu hejtis la fornon kaj vodko por varmigi ne plu sufiĉis, por vintro revenis en Pragon. Li transdonis pretan scenaron aŭ novan libron aŭ kio ĝi estis, kaj faris ordon en mia vivo. Li engaĝis protektajn kuracistojn, protektan okulklinikon. Tiam estis tia tempo – ĉio, kio al vi nun ŝajnas normala, tio estis tiutempe protekta. Bonŝance mi pri tio neniel interesiĝis. Nur pli poste, laŭ rakontado de panjo, mi multajn aferojn komencis kompreni.

La duan klason de baza lernejo laŭ konsilo de doktoroj mi komencis jam en speciala lernejo por lernantoj kun dikaj okulvitroj aŭ eĉ sen ili, kiam eĉ la optiko ne helpis al ili. En la klaso ni estis malmultaj kaj mi estis kompleta venkinto, ĉar kompare kun la kunlernantoj mi vidis kiel Linko linko. Ĉio estas relativa, foje ankaŭ vi pri tio verŝajne havos konon.

En mia animo tiam estiĝis negrava ŝizofrenio, kiel mi pendolis inter Prago kaj Kvildo. La tuta somero, ĉiuj lernejoj ferioj, la ŝtataj festotagoj, libertempo kaj plejparto de semajnfinoj apartenis al Kvildo. Tie mi estis feliĉa kaj libera kiel birdo. En vendejo oni diris al mi, kio konkrete estas havebla kaj mi laŭ tio povis aĉeti tion, por kio mi havis apetiton. Neniu insultis min, ke mi ne salutas, la tuta Kvildo sciis, ke mi estas blindeta knabino de Rudĉjo Kalčik.

„Paĉjo, mi ne komprenas la kalkuladon kun krampoj kaj panjo ne havas tempon, ŝi devas lavi tolaĵon kaj gladi,“ mi trudis miajn zorgojn al la nuko de la patro. Mi sendube konkuris kun la nefinita Kvadrato de virino, sed tamen li deturnis sin de skribmaŝino kaj dediĉis al mi sian altvaloregan tempon. La krampojn li klarigis al mi, sed el la skriba ekzameno la sekvan tagon mi ricevis malbonan noton. La kamarado paĉjo ekkoleregis kaj iris al la kamaradino matematik-instruistino por klarigo. Li revenis netradicie silentema, sidigis sin al la tajpilo kaj ekde tiu tempo li neniam plu interesiĝis pri mia klereco. Kontraŭ ĉiu atendado mia lernado tute prosperis, almenaŭ tiom, ke mi plenumis la maturec-ekzamenon. Sed ĉio ĉi estis en Prago. Lernejo neniam malpurigis la bildon de Kvildo en mia spirita vidsento. En Kvildo mi ne lernis, sole se la situacio fariĝis tre akra. Eĉ ne pripenseble, neniigi mian meritplenan liberan tempon, eĉ ne hazarde!

Paĉjo havis sur la tablo „Blanka siringo“-n, do precize la finitan manuskripton, kaj rilaksiĝis per legado de nekompreneblaj eseoj aŭ per studado de latinaj klasikuloj en originalo. En tia tempo la skribmaŝino tiom ne klakis, kaj la Verkisto, laca de legado kaj de rumoro de hejmo, ekmarŝis el la domo. Ĉu la naturo? Ĉu la arbaroj? Ĉu la fontoj de Vultavo? Ne ridindigu vin! Pri tiuj ĉi aferoj vi povus demandi min aŭ panjon. Paĉjon neniam. Verŝajne la naturajn

memorindaĵojn li per propraj okuloj ne rimarkis, sole se li povis ion ekvidi rigardante tra l' fenestro de la laborejo aŭ dumvoje en la gastejon. Tamen li konis la tutan Ŝumavon pli bone ol la lokanoj. Li sciis pri ĝi kaj pri ĝiaj loĝantoj, vivaj aŭ mortaj, absolute ĉion. Lia postdiploma studado okazis en la gastejo, en vilaĝaj baloj aŭ ĉe hazarda intervidiĝo kun najbaro. Kvildo estis lia dua universitato kaj samtempe tia platona amo. Ĝi estis kvazaŭ li havus amatinon malantaŭ fenestra vitro. Sed li ĝin vere ĝuis.

Post la ekzameno pri matureco dum nelonga tempo pro malbona vidkapablo mi ne povis trovi decan laborlokon. Tio, kion oni serĉis sen multa peno, estis amoj. Tute ne platonaj. Tiutempe estis en Kvildo roto de junaj soldatoj, da kiuj estis dekoble tiom, kiom ni bubinoj en la plej bona disvolviĝo de juneco. Tio al vi en Prago ne okazos! Eĉ ne gravis, ke la bubojn mi malforte vidas. Ili mem zorgis pri tio, ke ili estu sufiĉe proksime en mia kaduka vidkampo. Al unu el tiuj belegaj junaj buboj mi preskaŭ edziniĝis. Li faris tian stultaĵon, ke li alkondukis kamaradon kaj kiel oni diras, fajrero transsaltis. Do, la fajrero el la kamarado sur min kaj inverse. Paĉjo frapis en la skribmaŝinon iun el siaj ŝemaj scenaroj, mi sentas, ke tiam temis pri iu el Tridek okazoj de majoro Zeman. Ne, ke mi ne vidatus paĉjon, mi heredis lian simpation al restoraciaj establaĵoj, kaj tial ni renkontiĝadis vendrede aŭ sabate. Kvankam ne ĉe unu tablo, sed tute certe en unu gastejo. Paĉjo estis fiero pri mi, mi estis bela bubino, eĉ se mi ne estis en akordo kun lia kultur-politika sento, li amis min. Mi dirus, ke li amis min eĉ pli ol Sovet-Union.

Dum mi kun la patro aŭtoro ĝuadis la dolĉan vivon ŝumavan, panjo anstataŭigis pordojn, fenestrojn kaj alkonstruigis pluan ĉambron al nia jam tute bela domo.

Dum la fluo de tempo mi kaj miaj kamaradoj anstataŭigis la gastejon per Rumbudo en la ĝardeno de Hermína. Hermína ankaŭ estis mia amo. Ne nur mia. De ĉiuj, kiuj konis ŝin. Ŝi estis absolute terura, aŭstrino, kiun komunistoj ne sukcesis elpeli. Ŝi edziniĝis al denaska kvildano kaj tiel ŝi fariĝis la civitanino de Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko. Relative frue ŝi vidviniĝis kaj ŝi devis fortostreĉe klopodi por vivteni siajn bubojn kaj ankaŭ sin. Ŝi laboregis kiel viro, sed nur dum la tago. Nokte estis aliel, ŝi estis vidvino tute vigla.

Mi ne scias, kio al ŝi enkapiĝis, sed de ia tempo ŝi komencis inviti en sian ĉaledon, kie ŝi loĝis jam sola, diversajn handikapitajn infanojn. Ŝi alkonstruigis kelkajn dometojn, kelkajn fekbudetojn, kelkajn mansardojn, kaj la pragaj infanetoj, blindaj, surdaj kaj lamaj havis travivaĵojn, pri kiuj ili eĉ ne revus, se ili restus en siaj institutoj. Hermína estis tia integra aganto. Ŝi integris en la Rumbudo gejunulojn de ambaŭ seksoj, civilulojn kaj soldatojn. Somere kaj ankaŭ post la neĝofalo en ŝia domo integriĝis malsanaj infanoj kun la sanaj, la fakuloj pri edukado kun la normalaj pionirestroj. En la preĝejo, maljuniĝinte kie ŝi estis servistino, ŝi integris komunistojn kun katolikoj. Ŝi diradis, ke la Sinjoro estas ĉi tie ĉefe por la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.

Kaj tiel ni ĉiuj amis nin reciproke kaj ni ĉiuj amis Kvildon.

Mi gravediĝis kaj edziniĝis. Ĝi ne estis bona ideo. La geedzeco jam estis disfalanta, kiam naskiĝis al ni knabineto kun malsanaj animo kaj korpo. Mia paĉjo mortis kaj la edzo fuĝis. Ni restis ĉi tie tri virinoj – la filino, mia panjo kaj

mi. Tiam la jaroj estis tiom pezaj, ke eĉ se Kvildo faris kion ajn, ni estis malfeliĉaj. La etulino eble ne, sed ŝia vivo haltis ĉe tri jaroj. Ni ne priregis tion. Ni trovis instituton, kie mia ĝismorte eta knabino vivas ĝis nun. Ne plu estas iu protekto fare de paĉjo, kio faciligus al iu la vivon. Sed en la instituto estas tre bonaj ordenaj fratulinoj kaj mi scias, ke mian filinon neniu iam ĉikanos, kiel tio okazadis al mi.

En mia vivo ne estis viro, kiu min iel apogus, iel savus. Sed Kvilda estis ĉi tie, eĉ se jam sen paĉjo, sen Hermína kaj sen belegaj junaj limgardistoj. Kio restis, tio estas la pompaj sovaĝaj arbaroj, kampoj, rivero kaj montoj. Ĝi estas kiel malfermitaj brakoj, kiuj firme ĉirkaŭprenos vin, kiam vi tion bezonas. Fakte estas, ke multaj arboj kaj lokaj homoj malmultiĝis kaj multaj turistoj kaj iliaj aŭtoj male plimultiĝis. Mi restis, kaj ankaŭ la amikoj, kiujn mi konas ekde mia beba aĝo. Samkiel mi ili ne loĝas ĉi tie, sed ni havas ĉi tie kabanon post niaj gepatroj kaj geavoj, kien ni ĉiam tre volonte veturas, nuntempe jam eble kun niaj genepoj. Kiel pli frue ni havas ĉi tie semajnfinojn kaj libertempojn, kiam ni renkontiĝas kaj fartas bone. Kaj ne nur tiujn homojn mi ĉi tie renkontas. Veturas ĉi tien ankaŭ miaj estintaj gesamklasanoj el la lernejo por la malforte vidantaj infanoj. Veturas ĉi tien koleginoj el mia profesio. Alvenas ĉi tien ankaŭ la posteuloj de mortaj kaj ellandigitaj germanoj, kiuj ĉion pardonis al ni kaj ni al ili ankaŭ. Espereble. Iu praga kamaradino ĉi tie aĉetis kabanon, ĉar post oftaj vizitoj ŝi konstatis, ke sen Kvildo ŝi ne povas vivi. Ŝi ne estas sola.

En Prago mi fartas tute bone. Mi havas mian laboron, miajn diversajn interesojn kaj amojn, mi havas plenkreskan bubon el dua geedzeco. Li estas bonkondata. Estiĝis vendredo kaj la fileto eksidas al stirrado. Neniam ni devas interkonsentiĝi, kien veturi. Tiaspeca demando tute ne havas signifon. Samkiel ne havus signifon demandi – kie ni havas la koron...

(Esperantigis Jiří Patera)

Novaj kontaktoj kun „najbara strato“...

(Komento de Margit Turková)

En la nova jaro – kaj kun nova redaktoro de la Bulteno, ni „malnovnove“ kontaktiĝis kun la organizaĵo de nevidantoj, kiu situas en la apuda strato Krakovská. Komence nia kunlaboro estu sur la literatura kampo: ni povas reciproke publikigi interesaĵojn. Nian klubon vizitis la redaktorino, kiu estas ankaŭ verkistino. Siajn poemojn ŝi publikigas sub la pseŭdonomo Delicie Nerková. Por komenco ni prezentas ŝin pere de rakonto; ŝia reala nomo estas Jaroslava Novotná.

KURIOZAĴOJ

El la kroniko de nia klubo de la jaro 1938 (transskribo malsupre):

da Ĉiunveno okazinta la 23.12.1938

Ĉeslis proksimume 30-35 personoj, kiuj en lastima interpavolado branknile franigis la tempon ĝis la 22^o horo. Tiam la ĉiunveno estis interrompita, kaj multaj rapidis al kafejoj tra radio apurato, ĉar la radiostacio promesis aŭdigi gravajn sciigojn. — En tiu ĉi malbranknile la tempo, kiam milito minacis ekplodi, kiam niaj nacioj kaj ŝtatoj, — perfiditaj de siaj amikoj, rompitaĵoj de siaj kunuloj kaj protektantoj, atencis heroe alankon de malamikoj. Ne mirinde ke ĉiuj rapidis en kafejan koridoron por aŭdi la filojn novajn novaĵojn.

... kaj tiam post la 22^o horo en streĉa atenco ni aŭdis la mobilizan ordonon kiu vokis ĉiujn ĝis knardeka jaro al iliaj regimentoj. — Ni estis multaj. Ikeris la acido, kora kaj sincera kaj tre mallonga: Ĉiuj rapidis hejmen, kaj post la noktomezo multegaj rekuris jam al siaj regimentoj por defendi la patrujojn de nia patrujo. Ni pol mil jarojn daŭris nia landino inter landoj niaj kaj najbara germanujo. Ĝi ne sangigis ĉi dum ni perdis nian sendependecan. — Kaj nun, en dudeka jaro de renaskiĝinta nia libera ŝtato, sub preteksto de „sindestina de popoloj“ germanujo simple frenas kio al ĉi plaĉas, kaj kun konsento de angla Chamberlain kaj franca Daladier, kristigas nian patrujon forprenante ne nur multegajn lokojn kaj distriktojn loĝatajn de germanoj, sed ankau tre multajn lokojn pure ĉiujn, kaj ĉiujn afmalavalimajn lokojn gravajn el vidpunktoj strategia kaj ekonomia. Tio ĉi, kun la konsento de niaj iamaj francoj, kaj anglaj amikoj — por „kavi la francoj!“ — Komprenu bone leganto: „Francoj, Angloj, Ŝtatoj, kaj germanujo, per niaj ĉefministroj, „Sanas la francoj“, per tio ke ili donacas al germanujo lion kio estis nia de fili al mil jaroj. — Nian landon —


ilia aĉa decido, ĉar en mala kazo estis danĝero ke Hitler (germanujo) atakos nin — kaj la praco estus interrompita

Hun nekultimaj sindono kaj entuziasmo ni obeis la ordonon mobilizari... sed reneno estis malgaja. Ni neke batalis — neke estis renkilaj. Sed interkonsento de luj knar en München malfermis grandegan parrigantaro munda sur la korpo ple nira ŝtato...

Nia klubo ĝis fino de jaro (1938) kunrenis neoficiala, ĉar deŭvis praktika malfermeo pri kunrenado. Niaj membroj militrenis diverse. Mi, tiel 37 jaraĵa renenis post ne lulaj tri renarĵoj. Sekel kelkaj malpli aĝaj militrenis ĝis jarfino.

La kunrenetoj okazintaĵ dum nia ne ĉesto, (la 30/9 kaj 11/10 1938) estis tre malnulle vizititaj. — La unuan vizitis ĉirkaŭ kvin, la alian praktimume dek membroj, laŭ la rekombato de kunrenintoj.

Fine de jaro 1938 ankveni his


Mister
L. J. J. J.
Davorlar
prezidento

La kunveno okazinta 23. 10. 1938

Ĉeestis proksimume 30-35 personoj, kiuj en kutima interparolado trankvile pasigis la tempon ĝis la 22a horo. Tiam la kunveno estis interrompita, kaj multaj rapidis al kafejstra radioaparato, ĉar la radiostacio promesis aŭdigi gravajn sciigojn.

En tiu-ĉi maltrankvila tempo, kiam milito minacis eksplodi, kiam niaj nacio kaj ŝtato, perfiditaj de siaj amikoj, trompitaj de siaj kunuloj kaj protektantoj, atendis heroe atakon de malamiko. Ne mirinde ke ĉiu rapidis en kafejan koridoron por aŭdi la plej novajn novaĵojn.

... kaj tiam post la 22a horo en streĉa atento ni aŭdis la mobilizan ordonon, kiu vokis ĉiujn ĝis kvardeka jaro al iliaj regimentoj. Ni estis multaj.

Sekvis la adiaŭo, kora kaj sincera kaj tre mallonga. Ĉiu rapidegis hejmen, kaj post la noktomezo multegaj veturis jam al siaj regimentoj por defendi landlimojn de nia patrujo.

Pli ol mil jarojn daŭris nia landlimo inter landoj niaj kaj najbara germanujo. Ĝi ne ŝanĝiĝis eĉ dum ni perdis nian sendependecon.

Kaj nun, en dudeka jaro de renaskiĝinta nia libera ŝtato, sub preteksto de "sindestino de popoloj", germanujo simple prenas kio al ĝi plaĉas, kaj kun konsento de angla Chamberlain kaj franca Daladier kripligas nian patrujon, forprenante ne nur multegajn lokojn kaj distriktojn loĝataj de germanoj, sed ankaŭ tre multajn lokojn pure Ĉeĥajn, kaj ĉiujn apudlandlimajn lokojn gravajn el vidpunktoj strategia kaj ekonomia. Tio ĉio, kun la konsento de niaj iamaj francaj kaj anglaj amikoj – por "savi la pacon!!!"

Komprenu bone leganto: "Francujo, Anglujo, Italujo kaj germanujo, per siaj ĉefministroj "savas la pacon", per tio ke ili donacas al germanujo tion, kio estis nia de pli ol mil jaroj.

Nian landon – Ĉeĥoslovakion ili devigis konsenti kun tiu-ĉi ilia aĉa decido, ĉar en mala kazo estis danĝero ke Hitler (germanujo) atakos nin – kaj la paco estus interrompita !!

Kun nekutimaj sindono kaj entuziasmo ni obeis la ordonon mobilizan sed reveno estis malgaja. Ni nek batalis – nek estis venkitaj -. Sed interkonsento de tiuj kvar en München malfermis grandegan sangantan vundon sur la korpo de nia ŝtato

Nia klubo ĝis fino de jaro (1938) kunvenis neoficiale, ĉar daŭris polica malpermeso pri kunvenado. Niaj membroj militservis diverslonge. Mi, kiel 37 jaraĝa revenis post ne tutaj tri semajnoj. Sed kelkaj malpli aĝaj militservis ĝis jarfino.

La kunvenetoj okazintaj dum nia ne ĉeesto (la 30/9 kaj 7/10 1938) estis tre malmulte vizititaj. La unuan vizitis ĉirkaŭ kvin, la duan proksimume dek membroj, laŭ la rakontado de kunvenintoj.

Fine de jaro 1938 enskribis

Šustr Jaroslav
prezidanto

(fotokopiis kaj transskribis Jindřich Košťálek)



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7